

La Suda Kruro

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,

Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

ro 43.

Melburno (Melbourne), Australio.

10 Januaro, 1924.

BRAZIL AGAIN.

Brazilian Government authorities—federal, state and municipal—have for many years been favorably disposed to Esperanto, and have frequently given practical effect to that sentiment in their legislation.

The latest instance comes from the town council of Rio de Janeiro. Having received recommendations from its legal and educational committees, the council decided that one of the conditions for promotion in the educational service should be that the teacher had had at least one year's experience in teaching Esperanto.

A GROUP OF DEAF MUTES.

The progress of our language among the blind has been a remarkable feature, ever since the early days. Now another section of the afflicted has taken it up.

At Bonn, in Germany, a group of thirty deaf mutes has formed a group for the study and use of Esperanto, presumably the first group of its kind in the world.

BROADCASTING IN ESPERANTO.

Two Continents Listen.

The radio-telephonic station of the Moscow Komintern (Communist International) is one of the most powerful now in existence and it is claimed that

it can be heard as far away as the Atlantic and the Pacific coasts of the Eurasian continent.

Recently the People's Commissary of Posts and Telegraphs arranged that a propaganda speech on the subject of the All-Russian Agricultural Exhibition should be delivered in Moscow, with a view to informing the world of the present position of Russia's agriculture and economy. The subject being one of universal concern, the international language was naturally chosen as the vehicle, and the speech was delivered in Esperanto.

The importance of this very obvious use of Esperanto in overcoming barriers made still more trying by the latest development of international, not to say intercontinental, communication can hardly be exaggerated.

Of less significance, though not of less interest, was the British Broadcasting Company's inclusion of an Esperanto item in one of its recent programmes. Mr. John Merchant, President of the British Esperanto Association, delivered a characteristic humorous address on "Esperanto—the only cure for a Tongue-tied World," and wound up with a few remarks in Esperanto, greeting any continental Esperantists who were listening, and at the same time giving his English audience an opportunity of hearing the sounds of the language.

Advices from abroad showed that Mr. Merchant's speech had been heard and the Esperanto part understood in

France, Holland, Switzerland, and Denmark, as well as throughout the British Isles.

"KING LEAR" IN ESPERANTO.

Yet another of Shakespeare's plays makes its appearance in an Esperanto translation. The Revs. A. L. Curry, F.B.E.A., and A. J. Ashley have finished the work of rendering "King Lear" into the international language.

With the plays already translated—"Hamlet" (by Zamenhof himself), "The Tempest," "Julius Caesar," "Macbeth," "As You Like It," "The Merchant of Venice," and "A Midsummer Night's Dream"—we now have eight of the plays in Esperanto.

Though a translation is after all only a translation, nevertheless it can effectively bridge the gap between utter ignorance and a very useful acquaintance with the contents of such a work, and most, if not all, of these translations are pleasing and accurate. And what language, ancient or modern, could hope to achieve more in reproducing the work of a master and maker of a language, as Shakespeare was of English?

Yet a translation may achieve much. The greatest model of English style is a translation—the authorised version of the Bible.

There is a minor point about these Esperanto renderings of Shakespeare, which I will tell you, strictly inter ni, while no ardent Shakespearian is listening. They are more intelligible to the modern English-speaking man or woman with a knowledge of Esperanto than the originals. Shakespeare used about 15,000 English words, and the average modern Englishman, even in these days of very diffused education, does not know more than about 5,000.

RELIGIOUS MOVEMENTS USE ESPERANTO.

Since the beginning the older-established Christian religious bodies have made use of Esperanto in work which entailed communication between persons of different languages. The whole of the Bible has been translated, prayerbooks, and books of instruction or devotion have been issued,

journals have been published, hymns, original and translated, have appeared, religious services have been held entirely in Esperanto, and the language has to some extent been used on the mission field.

Non-Christian bodies have, in an even more striking way, taken up Esperanto. The instance of the Bahai movement is well known. It is not so many years since Abdul Baha, the leader of this movement, solemnly commanded his followers to learn and disseminate Esperanto for the benefit of all mankind, evidently regarding it as a divinely ordained means of promoting the brotherhood of the human race.

As a result of this command, many Bahaists, principally in Persia and America, have taken up the study of Esperanto.

The latest religious institution to make use of Esperanto is that of the Oomoto sect in Japan, which appears to take the same view of the international language as the followers of Abdul Baha. It is the more remarkable in the case of the Oomotoists, as many of them had looked upon the use of any foreign words as a thing to be despised and, in fact, blasphemous. Their leader, Wanisaburo Deguchi, however, has urged upon them the necessity of utilising the rapid expansion of Esperanto throughout the world for the dissemination of their ideas, and has interpreted a passage of the Oomoto Scriptures about a simple, easily-learned language, which will dispel the difficulties of lingual diversity, as referring to Esperanto. According to "La Revuo Orienta," several classes of Esperanto are included in the educational programme of the Honza, or centre of Oomotoism, in the town of A'iabe, in Japan, and many persons already have a good knowledge of the language.

The Christian Endeavour Union has for a number of years made use of Esperanto in a desultory way, and the International Bible Students' Association, having given Esperanto its blessing on some occasion in the distant past, had apparently thought no more of it until the recent conference at Cedar Point, Ohio, U.S.A., when some 10,000 persons are said to have assembled from various parts of the United States, Canada, and Europe.

The resolutions of the conference, and a book written by the President, Mr. J. F. Rutherford, entitled, "Millions Now Living Will Never Die" have been translated into Esperanto and are being distributed throughout the world. In addition, a propaganda journal, "La Ora Epoko-Esperantisto" is being issued for the purpose of bringing Esperanto yet more prominently before the members. Esperanto, it appears from this journal, will be the base of the perfect language of the Golden Age, and the Golden Age is to begin very shortly—statements which are comforting to us as Esperantists and as men.

PREZIDANTARO de A. E. A.

La nova prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio estas sinjoro W. H. King, el Wellington (Nov-Zelando). Viceprezidantoj estas sinjoroj C. Main, el Perth (Okcident-Aŭstralio) kaj A. J. Sycamore, el Brisbane (Kvinslando). La Melburna viceprezidanto estas sinjoro Henriko Byatt.

Al la novaj oficistoj gratulon.

NEW ADDRESS — NOVA ADRESO.

Bonvolu noti la novan adreson de "La Suda Kruco": Box 731, Elizabeth-st. P.O., Melbourne.

NOVAJ DELEGITOJ DE U. E. A.

Oni kun plezuro anoncas, ke la jenaj lokoj en Nova Sud-Kimrujo jam havas delegitojn de Universala Esperanto-Asocio:

Mount Victoria: Sinjoro H. R. Rienits.

Nowra: Sinjoro G. D. Kvarnstrom, "Anza," Illaroo-road.

Nelson Bay: Sinjoro S. R. Richardson, Public School.

Bogan Gate: Sinjoro W. A. Marshall.

Guyra: Sinjoro F. J. Mann, jurnalisto.

PAROLADOJ DE GESINJOROJ DRUMMOND.

En la Australian Church (Aŭstralia Preĝejo), Melburno, la 12-an de decembro, sinjoro W. J. Drummond kaj sinjorino M. Drummond rakontis Angle al tre interesata aŭdantaro pri sia peresperanta vojaĝo tra Eŭropo kaj vizito al la XV-a kongreso en Nurnberg.

De la momento kiam, alveninte en la kontinenton Eŭropo, ili tuj trovis delegiton de U.E.A. kiu ilin gvidis kaj helpis pri la diversaj bezonoj de vojaĝanto, ĝis la lasta momento de sia restado en eksterlando, gesinjoroj Drummond ĉie spertis la utilon de Esperanto. Al la aŭdantaro ili klarigis en viveca, vidiga maniero sian vojaĝon tra la antikva mondo, nete pridirante la belaĵojn de la vizititaj lokoj kaj diversajn, jen gajajn, jen negajajn epizodojn de la vojaĝado.

Sed antaŭ ĉio estis frapanta kaj impresiva la rakonto pri la ĉie reganta sento de frateco inter ĉiulandaj Esperantistoj. Nenie, estante inter Esperantistoj, ili sentis sin eksterlande; ĉiam ŝajnis kvazaŭ ili estus en sia propra lando inter siaj samlingvanoj. Falis la baroj de la lingva diverseco, kaj ilia falo ankaŭ forportis grandaparte la barojn de la nacia diverseco. Do renkontigante sur la neŭtrala tero de komuna lingvo, ili povis esti ne kiel Angloj kun Aŭstroj, Hispanoj kun Rusoj, sed . . . homoj kun homoj.

Sinjoro Drummond firme tenis nian atenton kaj intereson per la seriozaj aferoj: la kongreso, la stato de Esperanto en Eŭropo, kaj la rolo de Esperanto ĉe la gravaj problemoj de la nuna mondo; temo ĉiam pensiga kaj alloga. Sinjorino Drummond rakontis kun sia konata vervo kaj sprito multajn detalojn el la vojaĝado, kaj per vortoj pentris bildojn de lokoj kaj homoj, kiuj jen amuzis, jen kortuŝis la aŭdantaron. Oni rajtas esperi, ke tiujn paroladojn gesinjoroj Drummond ofte ripetos en multaj rondoj, kien ankoraŭ ne penetris nia lingvo.

La kunvenon prezidis sinjoro Robert

ĈIU ESPERANTISTO

ĈU MALPROKSIMA, ĈU PROKSIMA AL
THE CHOCOLATE BOWL.

povas mendi niajn altgradajn. ĈOKOLADOJN PER POSTO. Ok unca ladskatolo, plenigita per diversaj ĉokoladoj, taŭge protektitaj kontraŭ difekto per varmo, k.c., kostas 3ŝ. (aldonu 6 p. en Viktorio kaj 8d. ekstere, por postelspezo). Ni ankaŭ liveras ĉoko ladojn en kartonoj je 3ŝ 6d ĝis 22ŝ 6d.

THE CHOCOLATE BOWL, 18 Centreway, Collins Street, Melbourne.

Jones kun sia kutima spriteco. Muzikan programon en Esperanto prezentis fraŭlinoj Tilly Aston kaj Florence Mauger kaj sinjoro Davidson; akompanis fraŭlino Amy Godfrey.

DANKO EL JAPANUJO.

La monkolleto inter la Aŭstraliaj esperantistoj por la viktimoj de la ter-tremo en Jokohama kaj Kobe atingis 6f. 10s (ses funtojn kaj dek ŝilingojn).

Skribante al korespondanto en Aŭstralio, sinjoro T. Itoo, sub adreso Fizika Instituto, Imperia Universitato de Kyushu, Fukuoka, en la jenaj elokventaj vortoj esprimas sian dankon:

"Laŭ via letero, samideanoj en Aŭstralio nun klopodas kolekti monon por niaj suferintoj. Dankojn, dankojn! Mi ne povas skribi ĉi tiujn liniojn sen larmoj.

"Ĉifono estus la prediko, kiun faradas la profesiaj predikistoj, sed la vera simpatio de Esperantistoj kunligas ĉiujn individuojn koro kun koro.

"Dankon, dankojn! por via afabla klopodo, kiu bone montras en la mondo la veran Esperantismon en hodiaŭaj tagoj iom malbonigitaj de profite-muloj"

LA UNUAJ IMPRESOJ DE FINNO EN AUSTRALIO.

La redaktoro de "La Suda Kruc" afable transdonis al mi spacon, por ke mi povu priskribi miajn impresojn en Aŭstralio. Sed por detala klarigo de la ekvidoj, kiujn mi ĉi tie havis dum la unua semajno, mi bezonus la tutan gazeton. Mi do faras nur supran rigardon al miaj travivaĵoj ĉe vi.

La unua afero, kiun mi perceptis, alborde ĝinte Aŭstralian kontinenton, estis pureco kaj agrabla klimato, kiu sendube tre plaĉis al mi, ĵus veninta el aŭtuna Finnlando. Kaj la varmo kaj beleco en la naturo! Tiom da vastaj kaj pitoreskaj parkoj kiel, ekzemple, en Melbourne, mi ankoraŭ ne vidis en iu alilanda urbo. Mi ne miras

se Melburnanoj fieras pri siaj Botanika Ĝardeno kaj "esplanado" de Sankta Kilda, ĉar ili ambaŭ estas vere pentrin-daj, eble unikaj en la mondo. Tie kreskas flanko ĉe flanko palmoj de la tropiko kaj arbegoj de la nordo.

La plej agrabla impresoj al mi tamen estis la nekredebla afableco, per kiu mi estis ĉi tie akceptita de la samideanoj. Unue en Adelaide mia korespondanto kaj la tiea delegito gastigis al mi unu neforgeseblan tagon en sia moderne bela urbo. Kaj ĉi tie en Melbourne mi estis vere surprizita pro la neordinara afableco de la samideanoj kontraŭ mi. Ĉio estis aranĝata por mi: loĝejo, ofico kaj multaj aliaj aferoj, kiujn mi sola, ne parolante la Anglan lingvon, apenaŭ estus povinta ordigi. Dum la unuaj tagoj ĉi tie mi sentis min kvazaŭ iu honora gasto en granda esperanta kongreso. Oni provis per ĉiuj eblaj manieroj distri min kaj forpeli eblan nostalgion.

Pri la esperanta movado en Aŭstralio mi estis ankaŭ mirigita. Antaŭ ol mi venis ĉi tien mi opiniis, ke Esperanto estas en Aŭstralio interesa nur de kelkaj idealistoj. Sed estas tute kontraŭe: esperanta movado estas ĉi tie tiel vigla kiel en kiu ajn lando en Eŭropo. Ekzistas pluraj grupoj, kiuj ĉiuj kunvenas regule unu fojon en semajno por studi la lingvon kaj ekzercadi sin en parolo. Kaj intereso saĝnas esti forta. Esperanto sukcesas ĉi tie paralele kun aliaj bonaj aferoj. Mi tute konsentas al diro de ĉi tiea samideano, ke Aŭstralio post ne longe fariĝos Ameriko de la Sudo. Ĝi havas ĉiujn avantaĝojn por rapida evoluigo.

Por fini mian skribaĵon, mi ripetas ankoraŭ, ke Esperanto estas mirinda afero. Per ĝi oni povas en daŭro de kelkaj tagoj havigi al si en fremda lando dekojn da amikoj kaj centojn da konatoj!

Lauri Laiho,

Melbourne, la 21-an el Helsinko,
de decembro 1923. Finnlando.

Hall's Book Store

'Phone: Windsor 6081.

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

264 CHAPEL STREET
— PRAHRAN —

(Opposite Town Hall.)

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

FRANCA VERKISTO PRI LA MILITO.

Vortoj de Guy de Maupassant.

Iu artisto, lerta pri tiu temo, iu ĝenia buĉisto, sinjoro de Moltke, respondis iam al la delegitoj de la Paco, jenajn strangajn vortojn:

“La milito estas sankta, de Dia starigo, ĝi estas unu el la netuŝeblaj egoj de la mondo; ĝi konservadas ĉe la homoj la plej noblajn kaj altajn valorojn, la honoron, la sindonemon, la virton, la kuraĝon, kaj malhelpas, unu-vorte, fali en la plej malbelegan materialismon.”

Tiel kunigi en bandoj de 400.000 homoj, marŝadi tage kaj nokte sen ripozo, nenion pensi, nenion studi, nenion lerni, nenion legi, al neniu utili, putriĝe de mulpureco, kuŝiĝi en la ŝlimo, vivi kiel la brutoj en senfina stulteco, prirabadi la urbojn, bruligi la vilaĝojn, ruinigi la popolojn, poste renkonti alian ŝandon ei homa viando, antaŭensalti sur ĝin, fari lagojn el sango, kampojn el pistita karno miksisita al la tero ruĝigita, amasojn da kadavroj, havi la brakojn aŭ la krurojn forportitaj, la cerbon dispremita, sen profito por iu, kaj morti en ia kampangulo, dum viaj gepatroj, via edzino kaj viaj infanoj mortas pro malsato . . . Jen kion oni nomas ne fali en la plej malbelegan materialismon!

La “homoj de milito” estas la vundoj de la homa gento. Ni bataladas kontraŭ la naturo, la nescio, kontraŭ ĉiuspecaj baroj, por plibonigi nian mizeran vivon. Kelkaj homoj, bonfarantoj, scienculoj, eluzas sian sanon laborante, plilargigante la sciencon, donante ĉiutage al sia patrujo bonstaton kaj fortecon.

La milito alvenas, post ses monatoj la generaloj detruis dudek jarojn de penado, pacienco kaj genio.

Jen kion oni nomas ne fali en la plej malbelegan materialismon.

Tradukis H. van Etten.

PAROLU! PAROLU!

Preskaŭ ĉiuj lernantoj celas almenaŭ legi kaj skribi, sed nur malmultaj celas paroli nian lingvon. Ofte oni aŭdas, ke tio ne estas necesa en Aŭstralio ĉar ĉiuj estas devigitaj paroli la anglan lingvon en tiu ĉi lando. Ankaŭ estas dirate, ke nur tiuj, kiuj povas fari marvojaĝon, bezonas la kapablecon paroli Esperante. Tion mi volas kontraŭstari; estas nia devo paroli la lingvon, kaj kapti ĉiun okazon por ekzerciĝado.

Eble la Esperantisto renkontos migrantan Samideanon sur la strato; kompreneble la renkontito portas la verdan stelon; vidante la stelon, la enmigra samideano, kiel kutime, salutas la alian. Imagu do la surprizon, kiu atendas lin, kiam la aŭstraliano balbutas nur kelkajn vortojn, tiuj, kiujn uzas la infanoj.

Kia granda plezuro estas paroli facile, kaj flue la internacian lingvon. Estas ja la devo de ĉiuj lerni paroli Esperanton, por ke ni povu kompreni unu la alian, spite de la malfacilaĵoj de la multnombraj lingvoj.

Povus okazi, ke Esperanta studento faras propagandan paroladon, kaj unu el la aŭskultantoj petos, ke li faru ekzemplan esperantan paroladon, por ke la ĉeestantoj aŭdu la sonojn de la vortoj. Tiam kia plezuro, ekparoli kelkajn belsonajn frazojn, kiuj allogas la estontajn Esperantistojn.

Denove mi konstatas, ke estas devo prizorgi la kapablecon paroli unu la alian, por pliperfektigi nian lingvan stilon.

—H. Byatt.

SUB LA LONICERO.

En trankvilo de somera la vespero, ripozante sub la verda lonicero, antaŭ ol la roso falos, antaŭ ol la ruĝo palos el ĉielo,—signo bona pri l' vetero:

PHILLIP ISLAND

The Ideal Tourist Resort.
6 hours from Melbourne by boat and rail.

“Redcliffs,” Newhaven.

Accommodation for 50 Guests.
First Class Table.

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, “Redcliffs,” NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

en trankvilo, sub la dolĉa lonicero,
revadante pri amata la afero,
kiu kuŝas ĉe la koro—
(kaj forestas la doloro
dum ĉeestas tiuj pensoj de espero);

en kontento, malproksime de danĝero,
de malico, de malbono, de kolerio;
tute sole kun pensado,
tute sole kun revado,
sub la ĉiam elspiranta lonicero—

jen naskigas la parfum' en la aero
memorarojn pri pasinta jam somero;
duonsankta la memoro,
kiu restas en la koro
pri amikoj, kiuj amis en sincero.

Restas nun feliĉo sub la lonicero,
ĉar la koron devas gardi la espero!
Antaŭ ol somero palos,
antaŭ ol la frosto falos,
povos esti bela tag' de kor-somero!

M. R. Cederman (N.-Z.)

OFT IN THE STILLY NIGHT.

De T. Moore.

En la silenta hor'
de dormo neveninta
revenas al memor'
la tempo longpasinta;
la rid' kaj plor' de knaba kor',
amvortoj parolitaj,
la helokul' de karegul',
la koroj nun ŝiritaj.

La morto prenis nun
tiaman amikaron:
la ventoj de l' aŭtun'
forblovis foliaron.
Ve! sentas mi, ke pli kaj pli
dezerte ĉie estas,
kun ĉiu flor' kaj lumo for—
kaj nur mi sola restas.

El angla tradukis M. C. Butler.

Oni povas mendi tole binditan jar-kolekton de "La Suda Krucio," el la dua kaj tria jaroj. Prezo 5ŝ. Letterkesto 731, P.O. strato Elizabeth, Melbourne.

NECESEGA HELPILO EN LA KRIMINAL-SERVO.

La tutmonda kongreso de kriminal-policistoj, antaŭ ne longe okazinta en Vieno (Vieno), (kies intereson por Esperanto ni pridiris en nia lasta numero), okupis sin pri la demando, ĉu ne estus rekomendinde enigi en ĉiun pasporton kaj legitimacion de la oficialaj institucioj fingrostampon de l' posedanto. Oni ne decidis rekomendi tion, ĉar tio kaŭzus multajn malfacilaĵojn kaj malhelpojn al la publiko. Sed evidente oni estis samopinia pri tio, ke tia procedo signifus esencan progreson en la batalo kontraŭ la krimo, se ĉiu estus devigata posedi stampan reproduktion de sia fingro. Tiam estus sendube eble tre rapide kapti multajn krimulojn, kiuj nun sukcesas kaŝi sin en la internacia cirkulado. La policaj institucioj en la lasta tempo ekkomencis interŝanĝi la reproduktarojn de la fingrostampoj. Se oni povus postuli de ĉiu internacia vojaĝanto pasporton kun fingrostampa reproduktaro, estus almenaŭ tre malfaciligit al krimuloj kaŝi sin en la internacia vojaĝantaro.

La eksterordinare granda graveco de la fingra stampo konsistas en unika aranĝo de la palporganoj de la homaj fingropintoj. La organismo de la palpiloj ne estas sensistema, sed formas longajn palpliniojn, kiujn oni povas observi je siaj propraj fingroj en multvariaj, kontraŭ- kaj ĉirkaŭ-irantaj sulkoj. La palplinioj havas la proprecon, ke ili ĉe la ekprenado per la mano restas preskaŭ neŝanĝitaj, tiel ke oni per reproduktaro de la linioj ĉiam povas rekonii la koncernan personon.

Aligis la fakto, ke tiuj linioj ĉe ĉiu homo formas alian bildon, per kio intermiksoj sekve de simileco estas efektive maleblaj.

La propoco de la fingro-stampoj jam antaŭ jarcentoj estis konata al la ĥinoj. En Eŭropo oni enkondukis ilin nur antaŭ ne longe. En la komenco oni malfidis al la metodo. Kiel konvinkigis la kongreso, hodiaŭ oni estas konvinkita, ke oni per la fingrostampo

Novjara Donaco al via Transmara Korespondanto.

LA SUDA KRUCO por unu jaro.

Por Kvin Shilingoj ni Sendos ghin.

posedas plej bonan armilon kontraŭ la krimuloj. Konforme al tio oni ankaŭ praktike kaj science perfektigis ĝin. La scienco ekzemple kalkulis, ke absoluta egaleco de la fingra stampo okazas nur inter amaso de almenaŭ 64 miliardoj da homoj kaj ke kvin miliardoj da jaroj devos pasi, ĝis kiam absolute egalaj fingro-stampoj estos haveblaj. Tiuj ĉi du kalkuloj estas valvaloraj al la certeco, ke egaleco en praktiko estas fakte neebla. En la praktiko oni diferencas en la rekono de fingra stampo tielnomatajn punktojn, t. e. certaj proprecoj. Entute ekzistas proksimume cent tiaj punktoj. Sed en neniu kazo estas necese konfati la identecon de ĉiuj ĉi tiuj punktoj por rekoni la fingrostampon, tro tian je la agejo, kiel tiun de certa persono. Sufiĉas ĝenerale 12 punktoj por fari tiun ĉi konstaton. Tio estas suŭvo, ke la unuopa fingra stampo estas en plej alta grado individua rekonilo. Tio estas des pli grava, ĉar ĉiuj postrestas je la krim-agejo sole la eroj de l' fingra stampo, kiuj tamen fariĝas rekonilo pro tio, ke ili havas tiun aŭ tiun ĉi karakterizan punkton.

Krimulo kompreneble estas tre gardema por ne postlasi rekonigan signon. Malgraŭ ĉio oni preskaŭ ĉiam povas post krim-ago malpurajajn akulojn, ĉar eĉ la plej malvarmsangaj krimulo ne evitas la postrestadon de la rekon-signoj. Li iel malpurigaĉas la fingrojn, kaj tiam oni trovas je la krim-loko la reprodukon de la fingra stampo. Eĉ se li estas plej gardema kaj kredas ne esti lasinta tian signon, li poste estas kaptata per la polico pri alia rezultato. Per kemiaj rimedoj estas eble rekoneblaj fingro-stampojn eĉ tiam, kiam la krimulo pleje penis fari sian tion per puraj kaj sekaj fingroj. La rezultoj de la kriminal-polico enhavas superordinare interesajn kazojn, en kiuj dank' al tiu ĉi helpilo la mano de

la justeco povis rapide ekkapti la krimulon.

RECENZO.

"Spoken Esperanto," by the direct method, for beginners. Norman W. Frost, Cambridge, Mass., U.S.A. Prezo, paperbindite, \$0.50; tolbindite, \$1.

La aŭtoro diras, ke laŭ sia kredo ĝis nun ne ekzistas anglalingve tia libro kiu difinas kurson por 200 lernejoj horoj. Li kredas, ke la sistemo pritraktata produktos Esperantajn parolantojn, kaj ne nur entuziasmulojn pri Esperanto.

La libro ŝajne tre taŭgas, en la mano de lerta instruisto, por uzo en lernejoj kaj pro la bildoj kaj vortaroj la instruisto trovos en ĝi ĉion necesan por plene instrui la lingvon.—(C. W. B.)

KRONIKO.

Townsville (Kvinslando). — Malfeliĉe la ĉtiea grupo perdis sian instruiston, sinjoro J. Rogers, kiu foriris. Espereble la grupanoj daŭrigos la lernadon, korektante kaj helpante sin reciproke. Por lerni Esperanton ne estas nepre necese havi spertan instruiston; la lingvo ja estas memlernenebla. Kiu volas, tiu povas!

Melburno (Viktorio). — Parolado de sinjoro G. Redfern antaŭ Metodista societo de viroj en kvartalo Auburn; tridek alestantoj.

Nelson Bay (Nova Sud-Kimrujo). — Nova grupo, gvidata de sinjoro S. R. Richardson, regna instruisto. Kunveno: la lernejo, jaŭde, je la 7.30.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, sept.-okt.; **Arguso** (Meksikio), nov.-dec.; **Bulgara Esperantisto**, okt.; **Esperantista Junularo**, sept.-okt.; **Esperanto Tri-**

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
BONA ODORA SPIRO
BONA RIDO
BONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro. E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

umfonta, n-roj 158-9, 160, 1, 2, 3, 4, 5, 167; **France-Esperanto**, aug.-sept., okt.-nov.; **Int. Medicina Revuo**, n-ro 5; **Katolika Mondo**, n-roj 4-5, 6-7; **Belga Esperantisto**, jul.-aŭg.; **Kosmoglot**, sept.; **Informservo de Internacia Labora Oficejo**, ses cirkuleroj; **Kristana Espero**, majo-aŭg.; **La Espero** (Stockholm), sept., okt.; **La Interligilo de l'P.T.T.** okt., nov.; **La Revuo Orienta**, aŭg., okt., nov.; **La Verda Ombro**, sep., okt.; **Literaturo**, jul.-sept.; **Litova Stelo**, sept., okt.; **Pola Esperantisto**, okt.; **Sennacieca Revuo**, nov.; **The British Esperantist** sept., okt., nov.; **Norvega Esperantisto**, aŭg.-sept.; **Internacia Stenografisto**, dec.; **Lumturo**, n-roj 3, 4, 5; **Golden Age**, okt.; **Esperantio**, n-ro 3.

ANONCOJ.

Sinjoro Seicii Jamada, Izumi, Jama-gata, Gifu (Japanujo), deziras inter-saŝi PM kaj PK.

Fraŭlino Annita Franz, via Pos-colle 55, Udine (Italujo), deziras kor-respondi kun ĉiuj landoj. Pl, PM.

GRUPOJ FILIIĜITAJ AL A. E. A.

(Prezidanto: sinjoro W. H. King, Wel-lington, Nov-Zelando.)

Sydney: Esperanto-Societo. Kun-venas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 ptm. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefsta-cidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Tay-lor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto. adreso, "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburna Sekcio de A.E.A.: Vic-prezidanto, S-ro H. Byatt; sekretario, S-ro P. T. B. Hudson. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth str. P.O., Mel-bourne. Kunvenejo: Hardware Cham-bers, 350 Little Collins Street, ven-drede vespere, je la oka horo.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunve-nejo kaj poŝta adreso: ĉe F-ino. P. Ab-

bott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, ĵaŭde je 3.30 ptm.

Dargaville: Esperanto Society.—Prezidanto, S-ro. Alfred Gregory. Sekretario, S-ro. R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kun-venejo: la legosalono de S-ro A. Gre-gory, vendrede vespere, je la sepa.

Hobarta Esperanta Grupo. Kun-venejo Eaton-Bray-lernejo, Davey St., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Pre-zidantino F-ino. C. M. Hannaford. Sek-retaria kaj poŝta adreso F-ino. A. Bec-kett, 177 Davey St., Hobart.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino. E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro. J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kan-garoo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

Carnegie: Esperanta Grupo. Pre-zidanto S-ro. Blundy. Sekretariino, F-ino. L. M. Irwin. Kunvenejo kaj poŝta adreso, "Kirkcald," 10 Woorayl St., Murrumbeena, (du domojn for de la Carnegie Kinema-teatro) ĵaŭde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto, S-ro. C. Casey, Sekretariino, F-ino. F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard St., Victoria Park, W.A. Kunvenejoj, vespere je la oka horo, James St. School, komencantoj marde; progres-intoj, 9 Pier St. ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Mel-burno. Prezidanto: S-ro. H. Byatt. Sekretariino: F-ino. I. Thomas, Kun-venejo kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta.—Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario, S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Mansé, Whangarei, N.Z. Kunvenejo: La domo de S-ro Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.